1 8 -02- 1992

# Informilo

Monata revuo de la estraro de FEL - 12a j. n-ro 1, feb. 1992

## Estraro

*Prezidanto:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Sekretario:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

*Membroj:* Jean Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk. Tlf. (056) 20 07 96.

Peter Berx, Klein Koosterstraat 17, 3570 Alken. Tlf. (011) 31 26 20.

Jan Bovendeerd, Meidoorn 42/2, 2640 Mortsel. Tlf. (03) 449 50 06.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* William Auld, Gerrit Berveling, Chris Declerck, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

11a de novembro 1991

## 1 Financo kaj planado

**Ĉeestas:** Ivo Durwael, Gerd Jacques, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh kaj Paul Peeraerts.

### 1.1 Investoj

#### 1.1.1 Komputilo

La prezoj de komputiloj ankoraŭ falas konstante. Pro tio Fred de Geus proponas ankoraŭ atendi pri la aĉeto de nova komputilo. Ĉetere li ne jam havis tempon por adapti la ekzistantajn C-programojn al la nova versio de Unix kiu estos uzata.

#### 1.1.2 Faldilo-vinktilo

Maŝino kiu tute aŭtomate arigas, faldas kaj vinktas kostas pli ol unu miliono. Sekve ĝi tre verŝajne restos bela revo. PP studos ĝis la januara kunveno aliajn eblecojn.

#### 1.1.3 Varmigo

Montriĝas ke la kaldrono de la hejtsistemo komencas liki. Tre verŝajne necesos renovigi ĝin venontan someron. PP petu ofertojn. Se 1991 donus profiton, ni nepre rezervu 150000 BEF por tiu renovigo.



## 2 Administra parto

**Ĉeestas:** La samaj escepte de Gerd Jacques. Aldoniĝas Alex Humet kaj Jean Pierre Allewaert.

### 2.1 Antaŭa protokolo

Al punkto 2.9. aldoniĝu: "kaj akcepti la asiston de alia kvalifikita instruisto dum unu jaro."

En punkto 2.12. la presaĵo nomiĝu: "informfolio".

### 2.2 Brusela grupo

La Bruselo grupo eksiĝis el FEL kaj APE. La estraro de FEL komprenas la dezirojn de la grupo kaj proponas pro tio revortumon de paragrafo 9a de la statuto de BEF: "Ĉiu aliĝinta asocio rajtas reprezentiĝi en la administrantaro de BEF per unu membro por ĉiu komenciĝinta kvindeko de aligitaj membroj al UEA dum la antaŭa jaro."

### 2.3 Adiaŭo Stefan Maul

La estraro proponas mencii ekde 1992 en *Monato* "Fondita de Stefan Maul".

### 2.4 Kampanjo *Horizon-taal*

La kampanjo Horizontaal fiaskis en Limburgo: neniu anonciĝis, sendube pro tio ke disdoniĝis nur kelkcento da informfolioj. Kortrijk alportis ĝis nun 4 lernantojn. En Antverpeno (5000 flugfolioj) reagis 6 personoj el kiuj 4 eksekvis kurson.

### 2.5 ILEI-ekzamenoj

Partoprenis 13 kandidatoj el kiuj 12 ricevis pli ol 50 % de la poentoj.

### 2.6 Belgio-Ĉinio

La asocio Belgio-Ĉinio petas kunlabori kun FEL. La estraro interesiĝas kaj petas al Raymond Wylleman esti nia reprezentanto.

### 2.7 Eco-92

FEL sendu senpagajn flugfoliojn.

### 2.8 Propono Texier

Prokrastita ĝis decembro.

Protokolis PP.

20a de decembro 1991

## 1 Financoj kaj planado

Ĉeestas: Ivo Durwael, Gerd Jacques, Paul Peeraerts (parte) Roland Rotsaert kaj Jos Vandebergh (parte).

### 1.1 Buĝetkontrolo

La kontrolo de la spezoj kaj de la buĝeto montras trankviligan evoluon. La enspezoj pro Monato iom falis en ĉi tiu jaro. La mono de la abonhelpa fonduso servos estonte precipe por igi la abonprezon akceptebla en malpli riĉaj landoj. Tie montriĝas granda interesiĝo. Sed eĉ duonpreza tarifo estas tro alta.

### 1.2 Eldona agado

Du libroj, presitaj en Litovio, survojas al nia lando. Prepariĝis 15 ĉapitroj de manuskripto de Hans Jakob pri la historio de UEA. La editorado de Mark Fettes daŭras pli longe ol antaŭvidita.



### 1.3 Investoj

Jam diversfoje oni priparolis eblecojn de aĉeto de maŝino por la fintraktado (kunigo, faldado, vinktado, tranĉado) de revuoj kaj broŝuroj. Oni prokrastis decidon pro tro alta aĉetprezo. Nun Gestetner proponas maŝinon je duono de la antaŭaj ofertoj. Oni denove ekzamenos ĝiajn eblecojn. Konsiloj de spertuloj estas bonvenaj.

## 2 Administra parto

Ĉeestas la samaj minus Gerd Jacques plus Alex Humet. Jean Pierre Allewaert senkulpiĝis.

### 2.1 Antaŭa protokolo

Ne jam pretiĝis.

### 2.2 Proponoj Bert Van Hove

Bert Van Hove proponis kompletan ŝanĝiĝon en la politiko de FEL. Li volis kontribui al la ellaboro de strategio. Ni dediĉis apartan kunvenon al tiu temo en la 30a de novembro. Pro diversaj kialoj, oni finfine decidis nun ne jam komenci la ellaboron de la proponoj de Bert. Bert jes pretas okupiĝi pri “kupola” Esperanto-dokumento: broŝuro por intelektuloj, kiu prezentas la tutan skalon da eblecoj de Esperanto.

Bert ankaŭ vekis nian atenton por pluraj esencaj mankoj, i.a. la manko de vizio. Sekve Ivo jam surpaperigis sian vizion pri la ebla estonto de FEL. La aliaj estraranoj skribos sian vizion aŭ siajn komentojn ĝis la 31a de januaro. Tiam la estrarkunsido ĉefe temos pri tio.

### 2.3 Disponigo de la subvencioj al la kluboj

Ĝis 1989 FEL ricevis subvenciojn precipe surbaze de ĝiaj elspezoj, kaj ekde 1990 surbaze de aktivecoj. Samtempe, la ministeriaj servoj anoncis, ke la subvencioj povus kreski ĝis 20 %. Per la akurata reago de la kluboj, kiuj ĝustatempe liveris siajn aktivec-raportojn kun la necesaj pruviloj, ni

efektive akiris tiun kreskon. Almenaŭ la koncerna servo telefone komunikis tion al ni, kvankam la mono ne jam alvenis. [1]. Per la akurata Tial la estraro decidis, ke post la ĝustatempa liverado de adekvataj aktivecraportoj (ĝis la la de februaro) kun aldono de pruviloj por ĉiu aktiveco, la grupoj ricevos bonhavon de 50 fr. por ĉiu aktivechoro. Tiun monon la kluboj povas uzi por mendi presaĵojn, informan materialon (kontraŭ stokvaloro) aŭ aĵojn el la libroservo.

## 2.4 Komerca reprezentanto por FEL

En 1988 ni vane serĉis reprezentanton por proponi Esperanto-Programitan en librobutikoj. PP demandis sin ĉu ne indus ree provi tion per anonco en fakrevuo pri eldono de libroj. Ni rezignas, pro manko de klara politiko ĉi rilate.

## 2.5 Proponoj J.L.Texier

J.L.Texier proponas kunagadon de diversaj landaj asocioj por prepari komunan kampanjon, kaj precipe por kun lanĉi reklamkampanjon. Post diskuto ni venas al la konkludo, ke la nunaj cirkonstancoj ne ebligas tion: mankas homfortoj kaj monrimedoj por iniciati tiel ambician planon, kiel ĝi estas prezentita de Texier.

## 2.6 Floriade

Okaze de tiu florekspozicio en Nederlando, la organizantoj eldonis belan esperantlinvan prospekton Ni volas kontribui al ĝia diskonigo kaj petos kvanton por dissendi kune kun Horizontaal en februaro.

## 2.7 Membrostatistiko

La nombro de niaj membroj denove iom falis. Neniu ĝis nun analizis la kialojn. Post diskuto, ni konkludis, ke la falo de la membronombro ne estas zorgiga se aliflanke kreskas la nombro da simpatiantoj. Pro antaŭa decido, oni jam du-foje en la jaro sendas Horizontaal al ĉiuj, kiuj

[1] Ili reale kreskis je 16 % kompare al la sumo kiun ni estus ricevinta laŭ la malnova sistemo.



en la lastaj jaroj petis informojn. Alex proponas eĉ foje aldoni instigan leteron kaj ĝirilon.

## 2.8 FEL-vojaĝo al Vieno

Ni planis veturi per 2 busetoj. Tio signifas 18 lokoj. Ĉar nun jam anonciĝis 14 kandidatoj, oni instigu interesatojn por rapide decidi.

## 2.9 Libroj por Kortrijk

Perdiĝis libroj kiun FEL disponigis al La Konkordo. Ĉar ne estas tute klare, kie okazis eraro, ni volonte akceptas la proponon de Jan Hansen por pagi nur la duonon de la fakturo.

## 2.10 BEF-kunsido

Okazos speciala kunsido por priparoli la deziron de la brusela klubo, por ne plu integriĝi en FEL kaj APE, sed esti konsiderata kiel aparta regiono. Tio postulas adapton de la statutoj. La estraro konfirmas sian starpunkton, ke ni ne kontraŭu tiun deziron de la brusela klubo.

## 2.11 Venontaj kunsidoj

vendredon la 31an de januaro 1992
vendredon la 21an de februaro 1992
sabaton la 21an de marto (jarkuns.).
Protokolis ID.

31a de januaro 1992

# 1 Financo kaj planado

Ĉeestas: Ivo Durwael, Gerd Jacques, Paul Peeraerts kaj Roland Rotsaert.

## 1.1 Spezokonto 1991

Ĝi ankoraŭ ne estas tute preta, sed tre supozeble ĝi finiĝos per gajno. *Monato* donis ĉi-jare malgrandan deficiton, verŝajne pro tio ke mankis tempo por fari abonvarban kampanjon. Pliaj detaloj sekvos en la februara protokolo. Se 1991 alportis gajnon, la estraro deziras unuavice rezervi monon por nova hejt-kaldrono (inter 100 000 kaj 150 000 BEF, inkluzive la malmuntadon de la malnova kaldrono); due ĝi deziras deskribi aron da apenaŭ plu vendeblaj libroj kaj trie krei rezervon por aĉetado de maŝinoj.

## 1.2 Eldona agado

Pro la demisio de Stefan Maul, al Paul Peeraerts mankis tempo por okupiĝi pri eldono de libroj. Neniu projekto do progresis. Du libroj kuŝas momente en la haveno, atendante doganan pritrakton.

La eldonado de *Monato* evoluis kontentige. Ne montriĝas prokrasto pro la demisio de Maul, male, la januara numero aperis komence de januaro, kaj la februara numero eĉ la 31an de januaro, do precize ĝustatempe. Ĉiuj novaj redaktoroj kaj kunlaborantoj laboris tre efike.

RR denove insistas, ke reklamoj pri FEL-libroj en *Monato* ne tro ofte ripetiĝu. PP provos pensi pri alternativoj.

## 1.3 Investoj

### 1.3.1 Hejt-kaldrono

La estraro decidas renovigi la hejt-kaldronon tiun ĉi jaron. PP jam ricevis du ofertojn kaj atendu ankoraŭ du pliajn.

### 1.3.2 Komputilo

La sistemo por fari savkopiojn estis riparita sufiĉe malmultekoste. Ni do verŝajne povos uzi la malnovan komputilon ankoraŭ unu-du jarojn. Pro tio ke la prezoj de komputiloj ankoraŭ falas, ne ekzistas kialo por aĉeti novan en 1992.



### 1.3.3 Fintrakto-maŝino

La tre granda premo en la centro dum la lastaj monatoj de 1991 kaj en januaro 1992 denove reliefigis la mankon de fintrakto-maŝino (arigilo-faldilo-vinktilo). Ni jam eksperimentis pri kelkaj maŝinoj. PP ankoraŭ esploros la rilaton inter kosto kaj rendimento ĉe la diversaj markoj. La estraro decidas ĉi-jare aĉeti ĉu aŭtomatan arigilon, ĉu faldilo-vinktilon.

# 2 Pleno

Ĉeestas: Ivo Durwael, Alex Humet, Paul Peeraerts kaj Roland Rotsaert.

## 2.1 Antaŭaj protokoloj

Ili estas pretaj sed la estraro preferas ne jam trakti ilin ĉar ili ne havis tempon studi ilin.

## 2.2 Nova protokolanto

Prokrastita pro malabundo da kandidatoj.

## 2.3 Rondvojaĝo Krause

Erich-Dieter Krause (D) ŝatus fari prelegvojaĝon en Flandrio en septembro-oktobro. Li postulas vojaĝkostojn, kiujn la estraro taksas je proks. 10000 BEF. Pro tiu alta sumo, ID esploros ĉu ankaŭ Nederlando interesiĝas pri la prelegvojaĝo, tiel ke eblos duonigi la kostojn.

## 2.4 Belgio-Ĉinio

Tiu ĉi asocio fondis laborgrupon por esperantistoj.

## 2.5 Informpetoj

La nombro de informpetoj ĉe la centro de FEL falis en 1991 al 79.

### 2.6 Ouderverenigiing voor de moraal

Tiu ĉi societo organizos la 26an ĝis la 28a de marto infoborson sub la titolo "Opvoeding zonder grenzen". ID esploros ĉu FEL povus partopreni.

### 2.7 Tienen

En Tienen oni denove organizos oficialajn Esperanto-kursojn, kunlabore kun la grupo Esperanto 2000.

### 2.8 Jarkunsido

La jarkunsido de FEL okazos la 21an de marto je la 14a horo en la sidejo de FEL, Frankrijklei 140, Antwerpen. Tagordo:

- Financa raporto pri 1991
- Sekretaria raporto pri 1991
- Financa subteno al la grupoj de FEL
- Elekto de novaj administrantoj de FEL
- Elekto de la nova estraro de FEL
- Elekto de nova prezidanto
- Kiel FEL aspektu en 1996?

### 2.9 Vojaĝo al Prago

Neniuj novaĵoj.

### 2.10 Civilservanto

Ekde la 4a de februaro laboros en la centro nova civilservanto Geert van Hecke. Li precipe okupiĝos pri movadaj aferoj.



### 2.11 Estrarano pri la domo

PP proponas ke ekde la jarkunsido FEL havu estraranon aŭ komisiiton pri la domo, kiu okupiĝu pri domaj riparoj, asekuroj, ktp.

### 2.12 *Service civil international*

Tiu ĉi organizaĵo jam organizis kun FEL laborkampon en Hastiĉres, kie Esperanto estis instruata. Ili estis same kiel ni tre kontentaj. Nun ili mem proponas denove organizi similan aranĝon, aliloke, por flandroj kaj valonoj, dum la paskaj ferioj. AH plu tenos la kontaktojn.

### 2.13 Bildo pri la estonto de FEL

Por tiu ĉi tagordero aldoniĝas Pieter Vets.

Merkatad-fakuloj avertis nin, ke en FEL mankas taŭga bildo pri la estonteco. Kiel FEL aspektu, ekzemple, en la jaro 1996? La proceduro por krei tian bildon estu proksimume la jena:

- Instigi al homoj surpaperigi siajn ideojn ĝis la 20a de februaro.
- Aperigo de tiuj ideoj en la februara numero de *Informilo*. Aperigo de enketo: Kiujn ideojn vi plej ŝatis? Kiuj ideoj estas realigendaj? Tiu numero de *Informilo* estu preta ĝis la jarkunsido. Rezultoj de la enketo estu en la sidejo de FEL antaŭ la 24a de aprilo.
- El la rezultoj de la enketo FEL provos distili konkretajn paŝojn farendajn, kun ĉiuj necesaj detaloj: kiam, kiom, kiel?

La tuto okazos sub la kontrolo de nia fakulo pri merkatado, Pieter Vets.

Protokolis: PP

# DECIDOJ

Tiu ĉi listo mencias kapvortojn pri ĉiuj decidoj de la estraro de Flandra Esperanto-Ligo kiuj ligas la asocion por la estonteco. La kapvortoj estas ordigitaj alfabete. Substantivo antaŭas adjektivon. Serĉu do "honora komitato" sub "komitato honora". Post la kapvortoj la du unuaj nombroj estas la jaro kaj la numero de *Informilo* en kiu aperis la koncerna protokolo. Poste venas la numero de la ero en la protokolo. Se la eroj ne estis numeritaj, estas menciita anstataŭe la paĝnumero kun la indiko *p*. Tiu ĉi listo estis finredaktita en 1a de februaro 1992. Ĝi enhavas la decidojn de septembro 1990 ĝis januaro 1992.


agadplano 90 7 3/90 6 2
Amnestio Internacia 91 4 2.2
anoncoj en niaj revuoj 90 7 1.2
Antwerpen 1993 90 6 4.9
asekuroj 91 2 1.5
BEF 92 1 2.10 p.7/92 1 2.2 p.3
bildo de FEL 92 1 2.13 p.11
Bruselo 92 1 2.10 p.7/92 1 2.2 p.3
budoj en UK 91 6 2.11.1
celgrupo 91 4 p.9
celo de FEL 91 6 2.12/91 4 p.9
Ĉinio 92 1 2.4 p.9/92 1 2.6 p.3
deskriboj 92 1 1.1 p.8
domstilo 91 2 2.4
donacoj al asocioj (NBN) 91 5 2.10.1
ekologio 92 1 2.7 p.4
eldonpolitiko (Urd Hadda) 91 1 2.2
eldonpolitiko 91 6 2.12
elektoj estraraj 91 3 p.9
Espeŭrop 91 1 2.1
Esperanto-kongreso Eŭropa 91 5 2.10.2
estonto de FEL 92 1 2.13 p.11
estraro (konsisto) 92 1 2.11 p.11
Floriade 92 1 2.6 p.6
forpasoj 91 6 2.2
Halbart 91 3 2.6 p.4
Het andere boek 91 6 2.11.3
Horizontaal (al kiu sendi?) 91 1 2.4
Horizontaal (kampanjo) 92 1 2.4 p.3/91 5 2.3/91 4 2.5/90 7 2.1
Horizontaal (revuo) 91 5 2.10.3/91 4 2.7/91 3 2.4 p.6/91 3 p.10/91 1 2.3
ILEI-ekzamenoj 92 1 2.5 p.3/91 6 2.9/91 5 2.8/91 4 2.4
informpetoj 92 1 2.5 p.10
instruado 90 6 2.5
instruisto kvalifikita 91 6 2.9/90 6 2.5
investoj 90 7 1.3/92 1 1.1 p.2
jarkunsido 92 1 2.8 p.10
kluboj lokaj (kunlaboro kun) 91 4 p.6
kluboj lokaj (vizitoj al) 91 4 2.3
komitato honora 91 6 2.2
komputilo 92 1 1.3.2 p.8/92 1 1.1.1 p.2/91 5 1.2/91 4 1.2
Konkordo, la 92 1 2.9 p.7
koresponda kurso 90 7 2.5
kursoj 92 1 2.7 p.10/90 7 2.5/90 6 2.5
laborplano 92 1 2.13 p.11/90 7 3/90 6 2
libroservo 90 6 2.1
libroteni (maniero) 91 5 1.1
libroj (deskribo de) 92 1 1.1 p.8
libroj (represo en evolulandoj) 91 2 2.3
lifto 91 3 2.2 p.3/91 2 1.4/90 9 1.4/90 8 1.6
lingvoborso Bruselo 91 1 1.3
Maul, Stefan 91 6 2.3/92 1 2.3 p.3





maŝinoj 92 1 1.3.3 p.9/92 1 1.1 p.2
membrostatistiko 92 1 2.7 p.6
Monato (provlegado) 91 4 1.5
Monato (represo en evolulandoj) 91 2 2.2
mortintoj 91 6 2.2
prelegvojaĝoj 91 3 p.10
prezentmaniero 91 2 2.4
problemoj politikaj (sinteno) 91 5 2.9/91 4 2.2
reprezentanto komerca 92 1 2.4 p.6
reprezentantoj en UK 91 6 2.4/91 3 2.2
rondvojaĝoj 92 1 2.3 p.9/91 3 p.10
seruro oficeja 91 4 1.6/90 6 4.6
*Service civil international* 92 1 2.12 p.11
statistiko 92 1 2.7 p.6
subvenciado de FLEJA 91 4 2.4 p.3
subvenciado de grupoj (pro livero de klientoj al FEL) 90 7 2.4
subvenciado de grupoj 92 1 2.3 p.5/91 3 1.3/91 3 p.10/91 2 2.6/91 1 2.4
subvenciado de Iwona Kosieba 91 3 1.4 p.5
Texier, Jean-Louis 92 1 2.5 p.6/92 1 2.8 p.4
Tienen 92 1 2.7 p.10
tradukreto 90 6 4.4
UK-budoj 91 6 2.11.1
UK Vieno 92 1 2.8 p.8/91 6 2.4
van Hove, Bert 92 1 2.2 p.5
varmigo 92 1 1.3.1 p.8/92 1 1.1 p.8/92 1 1.1.3 p.2
VIA 92 1 2.12 p.11
vidbendservo 91 4 2.6
vojaĝoj (Prago) 92 1 2.9 p.10
vojaĝoj (Vieno) 92 1 2.8 p.8

# FLEJA-estraro: protokolo

9a de novembro 1991

**Ĉeestantaj estraranoj:** Al Alberto, André Ruysschaert, Eddy Van den Bosch, Jan Vanuytven, Pieter Vets, Stefaan Cottenier. **Ĉeestantaj ne-estraranoj:** Geert Dedapper, Lydia Kerremans, Patrick Harick, Peter Ameye, Wim Slootmans.

## 1 Sinprezento

Pro la multaj novaj ĉeestantoj ĉiu sinprezentas.

## 2 Celo de la kunveno

Dum la pasintaj jaroj FLEJA havis plejofte po 2 estrarkunsidoj ĉiujare: okaze de la Gentaj Zamenhoffesto kaj Ŝercpromenado, en la domo de Patrick kaj Désirée. La nuna kunveno — kombino de estrarkunsido kaj gastronomia manĝo — celas prezenti la FLEJA-funkciadon al kelkaj novaj interesatoj.

## 3 Raporto pri la antaŭa FLEJA-semajnfino

### 3.1 Historio de la FLEJA-semajnfinoj (André)

La FLEJA-semajnfino okazis ĉiujare ekde '77 kun maksimuma partoprenantaro de iom pli ol 100. Dum la pasintaj jaroj ni apenaŭ atingis kvinonon de tiu nombro pro kio ekestiĝis eĉ malprofitoj (kvankam nia



semajnfino ne precipe celas al mona gajno, tio tamen estas malagrabla). La pasintjara semajnfino en Eeklo, unuafoje somere, allogis 20 homojn, sed ne estis financa malprofito. Malgraŭ la malmultaj homoj tamen gravas ke io okazis.

### 3.2 Financaĵajoj (An)

La Eeklo-a semajnfino havigis gajnon de 10 % de la tuta kosto.

### 3.3 Venonta semajnfino

Estas konsento organizi semajnfinon denove en Eeklo (pro la senpaga ejo). Pri la datoj estas du proponoj: de la 26a ĝis la 28a de junio aŭ de la 28a ĝis la 30a de aŭgusto. Junio havas kiel avantaĝon ke restos pli longe lume ekstere (tio gravas por la kradrostado). En aŭgusto eblas allogi eventuale eksterlandanojn kiuj post somera kongresado estos en la "ĉirkaŭaĵo". An je mardo tuj provos mendi la ejon por aŭgusto, okaze de maleblo por junio[1].

Pri la organiza teamo:

- Willem Rasschaert jam antaŭe anoncis sin kiel centra organizanto.
- André organizos la gazetaran diskonigon, i.a. per alskribo de la Flandraj lokaj grupoj kaj de Nordfrancaj, Nederlandaj kaj Okcidentgermanaj lokaj grupoj. Li kunmetos ankaŭ la aliĝilon.
- Patrick aranĝos libroservon.
- An kaj Patrick organizos la biciklan tagon (=sabato).
- Kuirado:
  - Patrick: supo por vendredo
  - Peter: kradrostado
  - Ela: la aliaj manĝoj

[1] Intertempe montriĝis ke en aŭgusto la ejo ne plu haveblas. En junio ĝi jes estas libera.

Por havi pli bonan superrigardon pri la partatempaj partoprenantoj André proponas al tiaj homoj vendi karton (ekz. biciklan, kradrostadan, ambaŭ,...).

Stefaan demandas ĉu dimanĉe antaŭtagmeze okazos ia prelego. André kontaktos Angelos Tsirimokos ĉirilate.

Ĉar la muzikinstalaĵo de la ejo montriĝis malfidinda (por la nuna estrarsemajnfino oni unu tagon antaŭe hazarde informis ke ĝi estas riparata) Pieter laŭeble kunportos kasedilon. Geert volas kunporti elektran pianon kiun li kapablas ludi. Eddy eble povos transporti ĝin.

En la regiono ekzistas loka televido. Peter informiĝos ĉu indas ĝin viziti kaj ĉu eventuale ni estas intervjuindaj.

Aliaj rimarkoj:

- Prefere plenigu la kuirejan liston jam vendrede vespere.
- Laŭeble efektive okazigu anoncitajn programerojn.

# 4 Financa parto

Eddy donas superrigardon pri la monrezervo de FLEJA kiu nun troviĝas en 8 diversaj kontoj (tio jam estas malpli granda nombro ol antaŭe). Situacio:

- 2 UEA-kontoj kun interezo de 5%. Parto de tiu mono estas donaco pri kiu FLEJA ne rajtas je la mono mem, sed jes je la interezo.
- "Kasbon" de 8% ĉe Kredietbank kaj preskaŭ malplena alia konto.
- Ĉe Generale Bank unu interezkonto kaj unu ĉiam alirebla konto ("lopende rekening").
- Poŝtkonto.
- FEL-konto.
- Iom da biletforma mono en la kaso.

Estas decidite pliraciigi tiun situacion en la jena maniero:

- La FEL-konto kaj la plej malgranda konto ĉe UEA (tiu kun nur propra mono) restos, por havi facilan interpagmanieron kun ambaŭ organizaĵoj.



- La poŝtkonto restos ĉar ĝi ebligas preskaŭ senkoste pagi eksterlanden. Oni transpagu al tiu konto nur monon kiun oni bezonas eksterlandiĝi.
- La "lopende rekening" ĉe Generale Bank restos ĉar tiu banko estas facile atingebla de Eddy, la kasisto.
- Ĉiu alia mono (krom la nepropra mono ĉe UEA) estos transportita al unu konto kiu liveru kiel eble plej grandan interezon sed kie la mono tamen ĉiam estu atingebla.

Pieter demandas ĉu FLEJA fakte ricevas subvenciojn. André respondas ke tio ne plu okazas. Antaŭe la Flandra registaro subvenciis la semajnfinojn, sed nun ne plu ĉar niaj semajnfinoj ne estas "multobligaj" (=ili ne edukas membrojn de la organizo al pli taŭga aktiviĝo en la organizo). Pieter informiĝos ĉu eble ne estas alia ebleco.

# 5 Diversaĵoj

- An proponas ke FLEJA aĉetu flagon. Principe estas konsento pri tio, sed ekestiĝas diskuto pri la fakto
  - ĉu la flago estu la oficiala esperanto-flago, aŭ
  - ĉu ĝi surhavu ankaŭ FLEJA-surskribaĵon.

  Nenio decidiĝas. Patrick informiĝos pri la kostoj ĉe Sonorilo, Stefaan ĉe konato kiu kudras. Pli durn la venonta kunsido.
- FLEJA ankoraŭ serĉas sekretarion. Post priskribo de la tasko Pieter akceptas tiun postenon (aplaŭdo).
- André anoncas ke en aŭgusto li eksiĝos kiel prezidanto. Kandidatoj por la vakonta posteno estas serĉataj.
- FLEJA rajtas je du TEJO-komitatanoj. Nun tiuj estas André Ruysschaert kaj Ilse Jacques. Ĉar la lasta ŝajne malaktiviĝis almenaŭ unu posteno vakos venontjare. André ankoraŭ ne scias ĉu li kandidatos por nova periodo. Kandidatoj serĉataj.
- Venonta kunsido: ĉe An (en Gent) okaze de la Zamenhoffesto (la 8a de decembro), je la 11a horo.

# 6 Kiu kion?

André: kontakti Angelos Tsirimokos

Peter: informiĝi ĉe la televido de Eeklo, informiĝi ĉe kelkaj bankoj

Eddy: aranĝi la formularojn por la montransigo

Patrick: informiĝi ĉe Sonorilo

Stefaan: informiĝi ĉe konata kudristino

Protokolis Stefaan Cottenier

8a de decembro 1991

Ĉeestantaj estraranoj: An Alberto, André Ruysschaert, Eddy van den Bosch, Peter Ameye, Stefaan Cottenier.

Ĉeestantaj ne-estraranoj: Willem Rasschaert (partatempe).

# 1 Financaĵoj

- Pliraciigo de la kontoj.

  Enketo de Testaankoop (oktobro 1991, pĝ. 4-14) montras Argenta-n kiel plej taŭgan por nia celo. La konto kien estos transportita plej granda parto de la FLEJA-mono troviĝos do ĉe Argenta. La elektita agentejo estas St.-Niklaas, ĉar plej facile atingebla de Eddy.

- La LKK de la 48a IJK en Montréal iam petis al FLEJA ĉu eblas ke eŭropaj IJK-ontoj pagu al FLEJA-konto, ĉar tio estas pli malmultekosta por ili ol unuope rekte pagi al Kanado. Ni perletere respondis ke tio eblas, kondiĉe ke FLEJA ricevu 1% por kovri siajn kostojn. La LKK ne reagis, sed en aliĝilo en TEJO-Tutmonde jes aperis la poŝtkonta numero de FLEJA. Por eviti miskomprenojn, Eddy ankoraŭfoje skribos por sciigi nian kondiĉon. Evidentas ankaŭ ke ni ne transpagos pli ol la sumon kiu troviĝos (en belgaj frankoj) sur nia konto, ankaŭ se intertempe la kurzo de la kanada dolaro ŝanĝiĝis.

- Nome de NEJ, Danny Ten Haaf sciigis ke ne plu eblas presi JEN-on ĉe la junularkonsilio (jeugdraad) en Nijmegen. La nunaj kostoj estis entute pr. po 4000 bfr. por ĉiu numero. Tio iĝos ĉe la plej malmultekosta presejo pr. po 8000 bfr., aŭ po 6000 bfr. se la presejo havas la eblecon enmeti duonan paĝon da reklamo. La lasta ebleco estos uzata.

- Koncize sendis memorigilon pagi fakturon kiu certe jam estas pagita. Eddy skribos por ĝustigi tiun miskomprenon.



# 2 Semajnfinoj

## 2.1 Burgunda semajnfino

Estas decidite organizi kadre de la jarkunveno en 1992 gastronomian semajnfinon, ekzakte: Burgundan Semajnfinon, kiel je la 9a kaj 10a de novembro en Eeklo.

Dato: de la 3a ĝis la 5a de aprilo 1992.

Kotizo: tiu de la pasinta gastronomia semajnfino + 200 bfr. (ĉar nun komenciĝos jam vendrede vespere).

Ejo: "Het Leen" en Eeklo, kiel pasintfoje.

Aliĝadreso: ĉe Peter.

Kontonumero: nia poŝtkonto.

Programo:

vendrede vespere: senprograme.

sabate: antaŭtagmeze la jarkunveno, posttagmeze kuirado kaj vespere manĝado.

dimanĉe: glitkuri.

Kunmeti aliĝilon: Stefaan (informos ankaŭ JEN-on kaj Koncize-n.

Ĉefrespondeculo: Peter (kuirado kaj aĉetoj).

Venonta kunveno de kunlaborantoj (Peter, An kaj aliaj): fine de januaro, laŭeble ĉe Ela kaj Eddy.

### 2.2 FLEJA-semajnfino

Dato: de la 26a ĝis la 28a de junio 1992

Kotizo: tiu de la pasinta jaro + 100 bfr.

Ejo: "Het Leen" en Eeklo.

Aliĝadreso: Willem.

Kontonumero: nia poŝtkonto.

## 3 Diversaĵoj

Venonta kunsido: dum la Burgunda Semajnfino.

## 4 Kiu kion?

Eddy: Malfermi konton ĉe Argenta, transigi la monon, fermi la ne plu bezonatajn kontojn. Leteri al Koncize kaj la kanada LKK.

Stefaan: Fari aliĝilon por la Burgunda Semajnfino, sendi ĝin al Peter kaj informi JEN kaj Koncize.

Protokolis Stefaan Cottenier.

## 5 Jarkunveno de FLEJA

La jarkunveno de FLEJA okazos dum la burgunda semajnfino, la 4an de aprilo je la 11a.